Mèng Hàorán,

# Somera vespero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda*

De l' montoj ora lumo nun
foriĝas en vespera pac'.
Ekestas trema bild' de l' lun'
sur de l' lageto la surfac'.
Kun loza kap-hararo mi
sur la teraso kuŝas nun,
kvietas mia vivo, ĝi
sin donas al la lum' de l' lun'.
Flariĝas melilot-odor',
ĝi lante supreniĝas al
la dom' dum la vespera hor',
susuras jen ros-guto-fal'.

*Traduko de la ĉina poemo "Shān guāng" de* Mèng Hàorán *(*689 – †740) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(*1938-11-04).*

*Arg-995-2008 (2014-04-21 20:09:05)*

*Mi, Manfred Retzlaff, espernantigis la poemon laŭ la germanigo, kiun verkis la germana poeto Manfred Hausmann. Pri tiu vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Manfred_Hausmann`*. La subtitolo "Somertage en Nanting mi sopiras al Xinda" signifas, ke la poeto, sidante en la suda pavilo "Nanting", sopiras je sia amiko Xinda.*